




NOVA AKADEMIANO: TREVOR STEELE



Esperanto sub la Suda Kruco

Majo-Junio 2001
Numero 51 (vol. 9, no. 3)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 51 (volumo 9, numero 3), Majo-Junio 2001

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: donaldbroadribb@mac.com

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St Redfern, NSW 2016, Aŭstralio. E-poŝte: libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte: hazgreen@tmba.design.net.au

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso donaldbroadribb@mac.com; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mg aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitaĵn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

La kovrilbildo: Trevor Steele ĉe unu el la Somerlernejoj de AEA. En aprilo 2001 Trevor estis elektita por naŭ jaroj al la Akademio de Esperanto. Pli da detaloj sur paĝo 13.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

| | |
|--|----|
| Oficialaj festotagoj en Esperantio | 5 |
| Librovendoj de UEA 2000 | 6 |
| Vizito al la nacia Esperanto-biblioteko (Jennifer Bishop)..... | 6 |
| Ĉu fakultativa akuzativo? (Eugène de Zilla) | 8 |
| Interrete | 11 |
| La ekzamenoj de AEA (Marcel Leereveld) | 11 |
| NZEA jarkunsido (Howard Gravatt) | 12 |
| Trevor Steele, Akademiano..... | 13 |
| Tri rakontoj..... | 13 |
| Oz: la lando sen problemoj (Joyce Bunting)..... | 15 |
| De la sekretario de AEA | 17 |
| Skribas la legantoj | 18 |
| Mesaĝo de la prezidanto de AEA.... | 19 |
| El la regionoj | 20 |
| Auditor's Report..... | 21 |

Recenzoj:

| | |
|---|---|
| <i>Esperanto en Ruslando: Historia skizo</i> (D.B.) | 3 |
| <i>La Hobito</i> de Tolkien (D.B.)..... | 3 |
| <i>Resurekto</i> de Tolstoj (D.B.)..... | 4 |
| <i>Rusaj Amnovejoj</i> de Ĉeĥov, Bunin, & Nabukov (D.B.)..... | 5 |

English Supplement


ESK estas legebla per la Interreto: <http://www.poboxes.com/esk>

Limdato por artikoloj por la julia numero: 15 junio.




Recenzas via redaktoro



Halina Gorecka kaj Aleksander Korjenkov: *Esperanto en Ruslando – Historia skizo*. Jekaterinburg: Sezonoj, 2000. 40p., broŝ. Takso: 

Nepre historio de la Esperanto-movado en iu aparta lando devas esti tre teda, ĉu ne? Sed, ne. Ĉi tiu verketo, malgraŭ sia tre malgranda amplekso, estas tre interesa kaj leginda.

Eble tio estas ĉar Esperanto komenciĝis en la Rusia imperio; eble ĉar en 1937-08 Stalin decidis ke la ĉefaj Esperantistoj en Rusio devas esti ekzekutitaj, kaj la movado en Rusio devas ekĉesi. Eble ĉar post la morto de Stalin Esperanto iom post iom repermesiĝis en Sovetio. Eble ĉar en la aktuala mondo Rusaj Esperantistoj denove estas grava influo en la monda movado, kaj la Eldonejo Sezonoj estas unu el la plej aktivaj kaj prestiĝaj eldonejoj Esperantistaj.

Ĉiukaze, al historiemoj mi multe rekomendas ĉi tiun broŝureton. 

John Ronald Reuel Tolkien: *La Hobito, aŭ tien kaj reen*. Tr. Christopher Gledhill (tr. de la poemoj: William Auld). Ilustris Maŝa Bojenova. Jekaterinburg: Sezonoj, 2000. 224p. bind. Takso: 

Min plezurigis legi ĉi tiun aventurromanon, verkitan Anglalingve en 1937 sed nur nun aperintan en Esperanto. La traduko fluas tiel nature, ke oni facile kredus legi originalan verkon Esperantlingvan. Pro tio, grandan gratulon al la tradukinto.

Malsimile al la grandega trilogio *La Kunularo de la Ringo*, *La Hobito* estas relative simpla, rapidmova verko, kies origino en rakontado al la infanoj de la aŭtoro estas klare rekoncible. Tial la leganto neniam enuas, la teksto neniam tedas. Krome, la ĉarme simplaj primitivstilaj ilustraĵoj desegnitaj de Maŝa Bojenova multe

kontribuas al la plezuro de la leganto. Egale plezurige, la preso estas klara, facile legebla. La bindo estas sufiĉe fortika, kvankam neniel luksa, la papero estas bona.



Se vi ĝis nun ne legis la romanon, jen bela oportuno ĝin legi kaj ĝui. La temo estas relative simpla:


Hobito nomita Bilbo (Hobitoj estis unu el diversaj homsimilaj gentoj el la fabelepoko) vivas komforte kaj senevente en sia vilaĝo truhejmo. Subite lin vizitas sorĉisto nomata Gandalfo, por inviti lin aventuri. Li ĝentile kaj firme rifuzas la inviton. La sekvan tagon alvenas granda nombro da gnomoj pretaj gastigi Bilbo, laŭ invito donita de Gandalfo. Montriĝas ke Gandalfo promesis al ili ke Bilbo (eksperta rompŝtelisto, laŭ Gandalfo) akompanos kaj helpos ilin dum trezor-serĉa aventuro.


Konforme al la fabeltradicio. ili intencas trovi drakon kiu gardas valorigan trezoron, mortigi ĝin, kaj forporti la trezoron por si mem. Bilbo ricevos parton, kompreneble.


Frue dum la aventuro Bilbo, sekve de enigmokonkurso kun strangulaĉo nomata Golomo, gajnas magian ringon kiu kapablas nevidebligi lin. Per la helpo de tiu ringo li sukcesigas ilin venki aŭ pacigi diversajn malamikojn (goblenojn [kiaj ili estas? Legu kaj informiĝu!], elfojn [ne similaj al tiuj en *PIV*], araneojn, kc.) kaj fine atingi la drakon mem.

La drako ja estas mortigita — mi

ne diros la kielon — kaj post kelkaj malagrablaj problemoj la aventuro sukcese finiĝas.



Ensume: bona aventurromano, ĉu por infanoj, ĉu por fantaziŝatantoj, do alte rekomendata. 

Lev Tolstoj: *Resurekto*. Tr. Viktor Sapojnikov. Jekaterinburg: Sezonoj, 2000. 268p. bind. Takso: .

Lev Tolstoj [Anglalingve ni kutime nomas lin *Leo Tolstoj*] eldonigis ĉi tiun romanon en 1899. Mi komencis tralegi la verkon iom heziteme, ĉar mi anticipis tre tedan malnovmodan rakonton — iom influis min memoroj pri klopodo legi *Milito kaj Paco*-n antaŭ pli ol kvin jardekoj; ĝi min plene konfuzis kaj malinteresis min pri legi Tolstojon.

Do min tre plaĉe surprizis trovi antaŭ mi tre rapidmovan, interesan rakonton kiu ne nur maledis min, sed konstante instigis min repreni la volumon por plu legi senhalte.

Iam, laŭdire, la komponisto Ŝostakoviĉ ironie komentis ke “Caro Nikolao II sekvis Caro Jozefo [Stalin]”. Nu, Caro Nikolao II, la lasta Rusa Caro, estis la Caro reganta dum la periodo de ĉi tiu romano, kaj “Caro” Jozefo estis la reganto dum la plejparto de la Sovetia komunisma reĝimo. La priskribo de la vivo kaj reĝimo en Rusio dum la periodo de Caro Nikolao II mirige (al mi) similegas al la priskriboj kiujn ni konas pri la vivo en Rusio dum la periodo de Stalin. La leganto demandas al si kiom da vera diferenco inter la antaŭ-Revolucia kaj post-Revolucia Rusio efektive ekzistis. Tre evidente Tolstoj respondus (kun Ŝostakoviĉ): nenia diferenco.

Tio ne estas nur sencela medito mia. Grandaparte *Resurekto* dediĝas al priskribo de la kondiĉoj de la rusa popolo, kaj al la tiamaj planoj por revolucio kiujn pretigis komunistoj. Tolstoj profete antaŭvidis ke en la praktiko tia revolucio malmulton ŝanĝos. Kaj tiel estis: la nomoj ŝanĝiĝis, sed la socia sistemo restis sama kvankam kun nova nomo. Unu aristokrataron anstataŭis alia, laŭteorie la ideologio malsamis, sed en la praktiko ĝi manifestiĝis idente.

La intrigo de la romano: en la domo de la familio de Princo Neĥludov estis servistino Maslova. Dum sia juneco Neĥludov havis tre fortan kristanan konsiencon, kaj liaj rilatoj kun Maslova estis nur tiuj de bonaj amikoj. Sed dum periodo de militistoserĝo Neĥludov perdis tiun konsiencon, iom perforte amoris Maslovan, kaj ŝin gravedigis. Li donis al ŝi “kompensan” monsumon kaj forgesis pri ŝi.

En la komenco de la romano, multe pli aĝa Neĥludov servas kiel ĵuriano en tribunala procezo kontraŭ putino. La putino estas...Maslova. La akuzo estas ke Maslova venenis diboĉeman viron, por ŝteli de li. Ŝi konfesas ke ŝi ja trinkigis al li la venenon, sed ke ŝi kredis ĝin nur dormigilo. Ŝi ne intencis mortigi lin.



Lev Tolstoj

La ĵurio konviktas ŝin, kredante ke ĝia verdikto temas pri senintenca mortigo, por kiu estus “nesevera” puno (ŝajne: ekzilo); sed pro kelkaj juraj eraroj en la vortigo, ĝi estas oficiale interpretata kiel murdoverdikto, kiu sekvigas severegan verdikton. Neĥludov, ŝokite, trovas ke la rimedoj por ŝanĝi la neintencitan verdikton estas longaj kaj komplekseĝaj. Li tamen entreprenas tiun taskon, kaj la plejparto de la romano priskribas tion. Li


devas apelacii al ĉiam pli altaj instancoj. Intertempe, Maslova estas traktata kiel murdintino, kaj estas metita inter la plej malestimatajn enkarcerigitojn (inter kiuj estas veraj krimuloj kaj senkulpuloj miskondamnitaj).


Dum Neĥludov ekzamenas la problemon de Maslova, li ŝokate trovas la diferencegon inter la vivkondiĉoj de la aristokratoj (inter ili ja estas li) kaj de la kampara popolo. La kamparanoj estas multrilate apenaŭ pli bonstataj ol sklavoj — kaj grandparte la aristokratoj traktas ilin kiel sklavojn.


Kiam li vidas la kondiĉojn de la enkarcerigitoj, li ekkonscias pri kiel fimalicaj estas la plenumantoj de la justico.

Pro la verdikto, Maslova estas kondamnita kiel murdinto, kies puno estas kondamno al bagnado¹. Dum multaj vizitoj al prizonoj Neĥludov ekkonas la krimularon kaj la kialojn de ilia enprizonigo; la detaloj multe pensigas min pri la sociromanoj de Charles Dickens.

Literaturistoj pretendas trovi en Neĥludov sinportreton de Tolstoj mem.

Al ĉiu serioza leganto mi elkore rekomendas ĉi tiun romanon. 

Anton Ĉeĥov, Ivan Bunin, Vladimir Nabokov: Rusaj am-noveloj. Tr. Grigori Arosev kaj Aleksander Korĵenkov. Jekaterinburg: Sazonoj, 2000. 24p. broŝ. Takso: .

Ĉi tiu broŝureto enhavas tri novelojn en la klasika Rusa verkstilo. Ili estas bone verkitaj kaj bone tradukitaj — kvankam eble ne tute kontentigaj por modernaj legantoj kiuj kutimas al iom pli rapidmovaj, aŭ pli emocidetalaj prezentaĵoj. Tamen por la amanto de la Rusa literaturo, aŭ por scivolemuloj pri ĝi, la libreto estas tre rekomendinda. 

OFICIALAJ FESTOTAGOJ EN ESPERANTIO

La artikolo 8, paragrafoj 2, de la PROJEKTO DE KAROLOVARO listigas la kvar oficialajn festotagojn de la naskiĝonta Esperanta Civito:

a) la 14a de aprilo, Memortago de ĉiuj Pioniroj;

b) la 26a de julio, Tago de la Esperanta Lingvo;

c) la 10a de aŭgusto, Tago de la Esperanta Civito;

ĉ) la 15a de decembro, Tago de la Esperanta Kulturo.

La lasta kaj la unua koincidas kun la naskiĝo kaj morto de Lazaro Ludoviko Zamenhof, la tria kun la lanĉo de la Pakto por la Esperanta Civito, en 1998.

Ĉi-lasta praktike koincidas kun la tago de la aprobo pri la FUNDAMENTO, PRI LA DEKLARACIO DE ESPERANTISMO kaj pri la Esperanto-flago, en Bulonjo-ĉe-Mar, 9 aŭgusto 1905.

Cetere, en la sama tago (sed de 1887) d-ro Zamenhof edziĝis al f-ino Klara Zilbernik: ĉu hazardo aŭ signo de l' destino?

Se ne ekzistas duboj pri tiuj tri datoj, mankas certeco pri la dato de la eldono de la UNUA LIBRO.

La Rusa cenzuro funkciadis laŭ du etapoj: unue ĝi permesis la eldonon, due ĝi permesis la surmerkaton.

La unua permeso datiĝas (laŭ gregoria kalendaro) 2 junio 1887: tiam la manuskripto ne estis plu modifebla.

La dua datiĝas 26 julio 1887: tiam la libro estis jam presita. Ambaŭ datoj estas konfirmitaj ĉe diversaj aŭtoroj.

Lastatempaj esploroj (pri kio en unu el la lastaj numeroj de *El Popola Ĉinio*) fiksas je 21 julio 1887 la presfinon ĉe la entrepreno Kelter en Varsovio.

[Laŭ Heroldo Komunikas]

¹Forced labour. — La bagnejoj poste famiĝis sub la nomo “gulagoj”.

LIBROVENDOJ DE UEA 2000

| Nombro da ekzempleroj en sume | Titolo kaj aŭtoro |
|-------------------------------|--|
| 485 | <i>Hejma vortaro</i> , red. Jouko Lindstedt |
| 477 | <i>Pasporta Servo</i> , listo de gastigantoj de TEJO |
| 349 | <i>Esperantaj sinonimoj</i> , Jaan Ojaloo |
| 275 | <i>Paĉjo, kio estas rasismo?</i> Tahar Ben Jelloun |
| 221 | <i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA</i> , gvidilo |
| 179 | <i>Saluton!</i> lernolibro, Audrey Childs-Mee |
| 173 | <i>Lito apud la fenestro</i> , rakontoj, Betty Salt |
| 164 | <i>Kio estas demokratio?</i> D. Beetham & K. Boyle |
| 129 | <i>Zamenhof, hodiaŭ</i> , A. Chiti-Battelli |
| 128 | <i>Diccionario de bolsillo</i> , poŝvortaro hispana |
| 118 | <i>Faktoj kaj fantazioj</i> , Marjorie Boulton |
| 114 | <i>La nigra insulo</i> , aventuroj de Tinĉjo |
| 113 | <i>Metodiko de la Esperanto-instruado</i> , R. Rakusha |
| 107 | <i>Monumente pri Esperanto</i> , Hugo Röllinger |
| 105 | <i>La laboro de UEA por pli paca mondo</i> , Ulrich Lins |
| 102 | <i>Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj</i> , Gosciny/Uderzo |
| 102 | <i>Kio ni estas kaj kion ni celas?</i> Pri Praga Manifesto |
| 100 | <i>Strategio de Esperanto en la nova jarmilo</i> , G.C. Fighiera |
| 96 | <i>Asteriks kaj Kleopatra</i> , Gosciny/Uderzo |
| 91 | <i>De tajgo al minaretoj</i> , A.Fighiera-Sikorska/J.Gibczynska |
| 38 | <i>La ŝtona urbo</i> , romano de Anna Lowenstein |
| 36 | <i>Apartaj mondoj: verboj kaj participoj</i> , Geraldo Mattos |
| 31 | <i>Gramatiko de Esperanto</i> , Miro- |

slav Malovec

- 31 *La ĉefaj principoj de fremdlingva instruado*, A. Melnikov
- 31 *Alico en Mirlando*, infanklasikaĵo, Lewis Carroll
- 29 *Cu ŝi mortu tra-fike?* seksa-krima romano, J. Balano
- 29 *Cent Ĉinaj fabloj*, komp. Gao Jingmin
- 29 *La vort-teorio de Esperanto*, R. de Saussure
- 28 *Lingva arto*, festlibro Auld/Boulton, red. V. Benczik
- 27 *Surklifa*, romano de S. Elgo
- 26 *Nomoj*, noveloj de J.H. Rosbach

[Noto: la librokvantoj listitaj por la unuaj 10 verkoj inkluzivas ekzemplerojn venditajn al aliaj libroservoj. Komence kun *La ŝtona urbo* la nombroj indikas nur ekzemplerojn venditajn al individuaj aĉetantoj.]

Rimarku ke el proksimume 4000 ekzempleroj venditaj, nur proksimume 440 estis de literaturo, dum la tuta jaro!

VIZITO AL LA NACIA ESPERANTO- BIBLIOTEKO

de Jennifer Bishop

Malofta oportuno aperis post mia reveno el Anglio post la forpaso de mia patrino. Mia edzo Alan bonkore planis vojaĝeton al Braidwood NSK por festi 60jariĝon de amikino el Sidnejo. Eble vi ne scias ke Braidwood estas ĉarma antikva urbeto ĉe grava vojokruĉiĝo, Kanbero estas nordokcidente kaj Bateman's Bay, bela turista loko, estas sudoriente. Ni sukcesis flugi senpage al Kanbero de kie ni luis aŭtomobilon por veture travagadi nian imponan ĉefurbon kaj la ĉirkaŭan kamparon.

Traironte Kanberon, mi nepre kaptis la oportunon por iom da Esperanto-kontakto. Unue mi aranĝis renkontiĝon kun Peter Hai, prizor-

ganto de la nacia Esperanto-biblioteko ĉe INSTITUTO POR INTERNACIAJ AFEROJ, mirinde taŭga loko, kaj due mi aranĝis kunsidon kun nia fidela amikino, Marj Ellyard, emerita membro de la ekzamena komisiono kaj kreinto de lerniloj inkluzive kompleton de vortludoj.



Peter Hai kaj Jennifer Bishop

Ĉe la biblioteko ni renkontis unue Bernadette-n kiu interalie prizorgas la bibliotekon de la Instituto. Plezurigis ŝin vidi interesatojn pri la Esperanto-biblioteko ĉar malmultaj homoj vizitas ĝin, plejparte kompreneble pro nuna manko de Esperantistoj en ACT.

Mia lasta vizito okazis antaŭ eble 5 jaroj, de kiam mi certe rimarkis la intertempan laboron de Peter Hai. Li multe ordigis la librojn sur la bretaro kaj stakigis kestojn antaŭ ĝi pro manko de spaco sur la bretoj.

Troviĝas trezoro de pli ol 2500 tekstoj kun pluraj binitaj kolektoj de gazetoj internaciaj kaj naciaj.

Ni parolis pri la ebleco sendi kelkajn kolektojn al la Nacia Biblioteko por konservado kaj por krei pli da spaco.

Tion Peter avide konsentis fari kaj pro baldaŭa revizito al Kanbero mi proponis kunporti el Melburno du ekzemplerojn de ĉiu numero de *Aŭstralia Esperantisto*, ekde la '50aj jaroj, antaŭulo de *Esperanto sub la Suda Kruco*.

Tio ne nur feliĉigis Peter-on sed ankaŭ Margaret Inglis-on, bibliotekist-

ino de MES kiu ofte plendas pro manko de spaco en la ŝrankoj. Estas daŭra problemo kion fari pri Esperanto-libroj kiuj reaperas post la forpaso de niaj amikoj kaj kiujn ni tute ne emas forĵeti.

Bedaŭrinde ankaŭ al la novaj Esperanto-grupoj en niaj najbaraj landoj ne tre allogas malnovaj libroj, sed nun ni scias ke almenaŭ ĉiuj Aŭstraliaj publikaĵoj en Esperanto trovas eternan lokon ĉe la Nacia Biblioteko.

Kun Marj Ellyard ni ĝuis kafumadon kuraĝigante ŝin ke Esperanto havas bonan estontecon en Aŭstralio kaj la tuta regiono Oceanio. Bonkore donacinte plurajn ekzemplerojn de la kompleto de Esperanto-vortludoj, ŝi ankaŭ fervore akceptis inviton deĵori ĉe Esperanto-budo dum la internacia konferenco GLOBAL GREENS 2001.

Atendu raporton pri GLOBAL GREENS 2001 en venonta ESK! □

Trinkis sian kutiman kafon Jozefo kaj Johana dum ili aŭskultis la radion. "Hodiaŭ estos 5 ĝis 9 cm da neĝo kaj estas deklarita krizostato," diris la veterprognozo. "Vi devas restadigi viajn aŭtojn sur la flanko de la vojo kun neparaj numeroj."

Diris Jozefo, "Do bone," kaj forlasis la tablon.

La sekvantan matenon, kiam ili sidis trinkantaj sian kafon, la veterprognozo sonis: "Estos 4 ĝis 5 cm da neĝo hodiaŭ, kaj krizostato estas deklarita. Vi devas restadigi viajn aŭtojn sur la flanko de la vojo kun paraj numeroj."

Ree respondis Jozefo, "Do bone," kaj forlasis la tablon.

Du tagojn poste, kiam ili estis trinkantaj kafon, la veterprognozo diris: "Estos hodiaŭ 10 ĝis 19 cm da neĝo, kaj krizostato estas deklarita. Vi devas restadigi viajn aŭtojn sur la ..." tiam malaperis la elektro kaj Jozefo ne aŭdis la ceteron de la instrukcioj.

Li sin turnis al Johana, "Nu bone, kion mi faros nun, Johana?"

Respondis Johana, "Ho Jozefo, nur lasu la aŭton en la garaĝo hodiaŭ."

[El *Tamen Plu*]

Ĉu fakultativa akuzativo? de Eugène de Zilla

Kiam nia lingvo estis nova kaj centro de atentoj amaj kaj malamaj, svarmis reformprojektoj. Kelkajn el ili atentis eĉ la Majstro¹. Unu el la reformprojektoj plej arde pridisputataj estis la parta, aŭ tuta, forigo de la akuzativo. La Esperantistoj preskaŭ unuanime rejetis ĝin, kaj tio nin kondukis al la “Ido-krizo”.

La *Fundamento*, deviga lingvobazo al ĉiuj kiuj pretendas paroli la Esperantan, konservas senesceptan akuzativon. La problemo povas do ŝajni eksa. Sed ne tiel estas. Kvazaŭ ĉe histeria neŭrozo per hipnoto flegata, la simptomoj malaperintaj remanifestiĝas sub alia formo.

La Esperantistoj konscie akceptis ke akuzativo ekzistas — neniu ja dirus ke “Petro manĝas *pomo” — sed, ne povante repuŝi la emon anstataŭigi la gramatikan akuzativon, jen per pozicia akuzativo (kiel en la Franca kaj la Angla), jen per akuzativo neŭtral-genra (kiel en la Latina aŭ la Helena), ni trovas, eĉ el plumoj de elstaraj verkistoj, propoziciojn similajn al “Voltaire ne amis *Rousseau”; aŭ “Kalocsay traduikis **La Tragedio de l' Homo*”.

Estas ankaŭ aliaj, pli subtilaj, formoj de la forigo (forĝeso?) de la akuzativo, sed ĉi tie mi volas konsideri nur tiujn ĉi du.

Nenio lasas supozi ke la *Fundamento* allasas la “senflekseblecon” de propraj nomoj kaj de verkotitoloj (kiuj ja estas propraj nomoj de verkoj), eĉ se ili estas plurvortaj.

Kial do eblas ke onian lingvosenton ne vundas “Voltaire ne amis *Rousseau”, kiu ja estas tute simila al “Petro ne amis *Paŭlo”.

“Voltaire ne amis Rousseau” signifas tute same kiel “Rousseau ne amis

Voltaire”!

Oni ne rajtas formi akuzativon per la simpla lokado de la rekta komplemento post la subjekto kaj la verbo. Tia gramatika vortordo ne ekzistas en nia lingvo.

Kelkaj lingvoj rigardas la fremdajn vortojn (kaj inter ili la proprajn nomojn fremdajn) kiel neŭtralgenrajn kaj — plej ofte — la neŭtralgenra finaĵo de la akuzativo estas la sama kiel la finaĵo de la nominativo.

Do Francalingvan aŭ Anglalingvan Esperantiston ne ŝokas “Voltaire ne amis *Rousseau”, ĉar li sentas la vorton “Rousseau” en akuzativo pro ĝia pozicio en la propozicio; kaj Greklingvan Esperantiston “Voltaire ne amis Rousseau” ne ŝokas ĉar li sentas la vorton “Rousseau” en akuzativo pro ĝia neŭtralgenra fremdeco.

Sed ilin trompas ilia lingvosento. Esperantisto kies unua lingvo estas aglutina tuj sentas ke la propozicio “Voltaire ne amis *Rousseau” estas ambigua kaj erara.

Hungaro, ekzemple, dirus en sia lingvo: *Voltaire nem szerette Rousseau-t*, tio estas: “Voltaire ne amis Rousseau-on”. Lia lingvosento de denaska parolanto de aglutina lingvo — kia estas, iagrade, ankaŭ la Esperanta — ordonas aldoni la finaĵon akuzativon. Cetere, sufiĉas “Esperantigi” la du fremdajn nomojn, kaj diri: “Voltero ne amis *Rusoo” por ke ia ajn Esperantisto sentu la falsecon de tiu ĉi propozicio.

Evidente ni devas diri: “Voltero ne amis Russoon”, kaj, ĉar gramatika regulo ne povas varii pro ortografia malsameco de la sama vorto, ni devas allasi ke la bona formo estas: “Voltaire ne amis Rousseau-on”.

La streketo ne estas deviga, sed ĝi bone elmontras ke la radikvorto “Rousseau” ne prononciĝas laŭ regu-

¹ = Zamenhof. (DB)

loj de la Esperanta elparolo. Ni retrovas la saman utilon de la streketo se ni volas adjektivigi, sen Esperantigo, ĉi tiun nomon: “rousseau-a”.

Se ni volas ortografian unuecon de ĉiuj fremdaj nomoj, ni devas ilin draste Esperantigi, kiel jam faris Rikardo ŜULCO (Rusoo, Russoon, russoa). Sed tiu ĉi farmaniero malebligas la rekonon de nekonataj fremdaj nomoj, kaj, sekve, ilian serĉadon en enciklopediaj vortaroj. Tiom longe kiom ni ne havas enciklopedion kiel la *Brita Enciklopedio* (pli ol tridek grandaj volumoj!), la drasta Esperantigo de fremdaj nomoj restos tre malpraktika. Kion do fari?

La unua kaj plej logika ebleco estas rigardi la fremdajn nomojn kiel fremdajn radikvortojn citatajn. Ni devas do skribi (kaj prononci, se ni kapablas): “Rousseau”, “Rousseau-on”, “rousseau-a”; aŭ “Καζαντζακίς”, “Καζαντζακίς-on” “καζαντζακίς-a”; aŭ “[Ĉinaj ideogramoj]”, “[Ĉinaj ideogramoj]-on”, “Ĉinaj ideogramoj]-a”.

Tio ĉi estas ĉiam ĝusta, sed ĉu tio ĉi estas praktika, bonstila, respektanta la leganton? Nu, evidentas ke ni ne rajtas postuli ke ĉiuj Esperantistoj konu ĉiujn skribosistemojn. La nomojn ne Latinliterajn oni devas transskribi. Kiel? La la oficialaj Latinliteraj transskriboj, kiuj, pro ekzisto de elektronikaj komunikiloj, ekzistas por ĉiuj lingvoj, kaj kiujn uzadas ĉiuj bonaj enciklopediaj vortaroj.

Do ni havos: “Rousseau”, “Rousseau-on”, “rousseau-a”; “Kazantzakis”, “Kazantzakis-on”, kazantzakis-a”; “[Mao zedong]”, “[Mao zedong]-on”, “[Mao zedong]-a”.

Bone, sed ni devas formeti la parentezojn de “Mao zedong”. Ĉu ni ekhavos “Mao-on zedong-on”, ĉu “Mao-on zedong”, ĉu “Mao zedong-on”? Ni havus la saman problemon kun “Rousseau” kaj “Kazantzakis”. se ni estus uzintaj iliajn kompletajn nomojn: [Jean-Jacques-on Rousseau]-on

kaj [Nikos Kazantzakis]-on. Ĉu “Jean-Jacques-on Rousseau-on”, aŭ ĉu “Jean-Jacques-on Rousseau”, aŭ ĉu “Jean-Jacques Rousseau-on”? Ĉu “Nikos-on Kazantzakis-on”, aŭ ĉu “Nikos-on Kazantzakis”, aŭ ĉu “Nikos Kazantzakis-on”?

La problemeto ne estas nur teoria.

Tiuj kies gepatra idioma estas sen-deklinacia povas heziti kaj elekti la akuzativigon de la “esenca” parto de unueca propra nomo.

Ekzemple, William AULD, en la (elstara!) traduko de *La kunularo de l' ringo*, skribas: “... ili devas enkalkuli Samon Vato”.¹ Auld Esperantigis la nomon “Sam” por ke ĝi estu prononcebla en akuzativo; “Vato” jam, estas Esperanta anstataŭaĵo de “Gamgee”.)

Li, do, samlogike, skribus: “Mao-on zedong”, “Jean-Jacques-on Rousseau”, “Nikos-on Kazantzakis”.

Tiuj kies lingvosento fontas el deklinacia lingvo ne tenas por absurda la imitadon de la Latina: “*Caesar Servium Galbam cum legione XII... misit*”² (Cezaro sendis Servius-on Galba-on kun la dekdua legio...). Ili do skribus: “Mao-on zedong-on”. “Jean-Jacques-on Rousseau-on”, “Nikos-on Kazantzakis-on”. Sed ili eraras, ĉar la Esperanta ne estas fleksia lingvo.

En aglutinaj lingvoj, la tria solvo estas la evidenta. Ni prenu ekzemple frazon de la Hungara verkisto REJTŐ Jenő (kaj neniu min plu riproĉu ke mi legas nur “bonan” literaturon!): “*Kivéve talán Marco Polót, aki bizonnyos fókig szélhámos volt, vagy Cecil Rhodes-t, ki inkább diplomatának számít.*” (“Escepte, eble, Marco Polo-on, kiu estis iomgrade fripono, aŭ Cecil Rhodes-on, kiun oni prefere taksas diplomato.”) La “-t” litero de la “akuzativo” aldoniĝas al la lasta vorto de la nomo. Do Rejtő, se li fiparolus

¹ TOLKIEN: *La kunularo de l' ringo* (trad. William Auld), p.123. Angle: *they'll have Sam Gamgee to reckon with.*

² CEZARO: *La gaŭlia milito*, III.I.

pri ili Esperante, dirus: “Mao zedong-on”, “Jean-Jacques Rousseau-on”, “Nikos Kazantzakis-on”.

Kaj ĉi lasta estas la ĝusta maniero, kuntaŭga kun la aglutina naturo de nia lingvo, Esperantigi plurvortajn nomojn. Ne estas logike enŝovi Esperanta(j)n finaĵo(j)n en plurvortan esprimon esprimantan ununuran koncepton.

Se mi diras: “Li renkontis Sansimonon”, mi esprimas la samon kiel dirante “Li renkontis [Claude Henri de Rouvroy de Saint-Simon]-on, ĉar [Sansimon-] egalas al [Claude Henri de Rouvroy de Saint-Simon]. Do oni devas diri: “Voltaire ne amis Jean-Jacques Rousseau-on”. Kun klare esprimita akuzativo post la lasta vorto de la nomo! (Oni rajtas, se oni volas, apostrofi la substantivigan “-o”n. “Voltaire ne amis Jean-Jacques Rousseau’n”.)

Ŝajnas al mi ke fremda nomo, titolo de verko, citaĵo estas kompleta bloko kiun oni ne rajtas disigi per enŝovo de Esperanta finaĵo. Mi do dirus: “ili devas enkalkuli Sam Vatton”, kiel mi dirus: “mi legis Mao zedong-on”; aŭ “mi legis Claude Henri de Rouvroy de Saint-Simon-on”.

Sed la ĝusta, logika, homogena solvo ne ĉiam estas la plej praktika. Mi preferas Esperantigi laŭ la Zamenhofaj ekzemploj (“Ŝillero”), la nomojn kiujn mi akuzativigas, aŭ de kiuj mi derivas adjektivojn. En nominativo mi lasas la nomojn tiaj kiaj ili troviĝas en bonaj fonto-lingvaj (Anglaj, Francaj, Germanaj) enciklopediaj vortaroj. Do mi skribas: Schiller, Ŝilleron, ŝillera¹; Rousseau, Russoon, russoa; Malraux, Malroon, malroa; Mao zedong, Mao zedongon, mao-zedonga ktp. Mi do skribus” “Voltaire

ne amis Russoon”, se Voltero ne estus tre konata kaj en-PIV-igita. Mi certe skribus “Giraudoux² ne amis Russoon”, ĉar oni malfacile trovas en enciklopedio “Ĵirodu’on”.

La titolojn ni rajtas trakti kiel la nomojn plurvortajn, ili ja estas nomoj de verkoj. La akuzativigo de la titoloj sekvas la samajn regulojn kiel tiu de plurvortaj nomoj. Sed ni atentu! Eĉ se la titolo estas unuvorta! Ni do skribas: “Desdemona vidis Otelon”; sed “Rossetti tradukis *Otelo-on*”. Samkiel ni diras ke “Kalocsay tradukis *La Tragedio de l’ Homo-on*”. La gramatiko ne starigas diferencon inter titoloj Esperantaj aŭ fremdlingvaj. Do ni devas diri: “mi lernas la *Pater Noster-on* kaj la *Gaudeamus igitur-on*”. Aŭ “mi legis (la) *Ezopa saĝo-on*”. Kiam citaĵo estas la rekta komplemento de transitiva verbo, ankaŭ ĝi postulas akuzativon. Ekzemple: “Neniam forgesu la ‘eĉ guto malgranda konstante frapanta’-on de Zamenhof”³. Aŭ: “ĉiam memoru la ‘ciniko, sola eblo’-on de Kalocsay”.

Mi ne opinias, kiel MAKKINK⁴, ke ni bezonas neologisman prepozicion (“na”) por akuzativigi plurvortajn nomojn kaj titolojn. Generale oni scias kie komenciĝas nomoj aŭ titoloj, pli gravas scii kie ili finiĝas, kaj tion ĉi tre klare indikas la “-on”. Se tamen oni volas indiki la komenciĝon, ekzemple de citaĵo, oni povas uzi “la” aŭ “tiu”. Ekzemple: “Li la ‘lasu fari-on ne akceptis”, aŭ “Kalocsay tradukis la *La tragedio de l’ homo-on*”.

La akuzativo ne estas fakultativa en nia lingvo. Ni memortenu la konstantajn “ne forgesu la akuzativojn”-ojn de nia unua Esperantoinstruisto. □

[Represita kun permeso el *La Gazeto* #92.]

¹ Mi lasas senmajusklaĵojn la adjektivajn formojn de ĉi tiuj nomoj, konforme al la originala teksto de Eugène de Zillah, kvankam la kutima regulo en *Esperanto sub la Suda Kruco* estas majuskligi ankaŭ adjektivojn derivitajn el propraj nomoj. — DB

² Franca verkisto, 1882-1944.

³ Laŭ la originala Francderiva ortografio de la teksto de Eugène de Zillah: ‘Neniam forgesu la « eĉ guto malgranda konstante frapanta »-on de Zamenhof’. — DB

⁴ MAKKINK: *Nia Fundamento sub lupeo*.

INTERRETE

• E-poŝtadreso: Korektoj kaj aldonoj:

Helen Baguley:

emmanuel@northnet.com.au

Anthony Gaskell:

agaskell@intercoast.com.au

Trevor & Suzanne Holton:

trevor@veganlist.com.au

Harald Lietz: hlietz@tassie.net.au

Dianne Lukes:

diannelukes@yahoo.com

Carol Lutz: lutz@alphalink.com.au

Stephen Pitney:

Pitney@Cybernetint.net

Ken Rolls: kenrolls@hotmail.com

Emma Song:

emmasong@hotmail.com

La ĉisupraj e-poŝtadreso estis kontrolitaj la 5 de aprilo 2001.

• **TEJO-aktuale:** nova ĉiusemajna novaĵletero legebla per Interreto, aŭ ankaŭ abonebla e-poŝte (senpage). Ĉi tiu informilo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo prezentas nelongajn raportojn kaj informojn kiuj povas interesi junulojn. (Domaĝe, la reteldono ne uzas Unikodon, sed prezentas la Esperantajn legajojn per la -h- kaj -x- sistemoj.) La retadreso: <http://www.esperanto.org/tejo/publikajhoj/aktuale/>

• Komuniko de Vinilkosmo:

Diskoj aĉeteblas nun enrete ĉe www.vinilkosmo.com

Post longega laboro finfine Vinilkosmo ĵus enretigis sian propran TTT-ejon.

Tiu nova TTTejo estas trilingva (en Esperanto, Franca kaj Angla). Ĝi ebligas malkovri fragmentojn de la diskoj de la katalogo de Vinilkosmo kaj mendi ilin enrete. Jam proksimume 40 titoloj disponeblas. Iom post iom aldoniĝos tekstoj kaj klarigoj, kaj ni ankaŭ ŝatus aldoni aliajn lingvojn

(Hispana, Germana kaj Portugala) por malkovrigi Esperantomuzikon ankaŭ al neesperantistoj. (Homoj kiuj pretas helpi fari tradukojn por la TTTejo en tiuj lingvoj sin turnu al ni).

Sufiĉas la klarigoj, nun ni invitas vin viziti nian TTTejon... Bonan promenadon en la Esperantomuzika mondo. <http://www.vinilkosmo.com>

Martinusologio: Estas kreita nova dissendolisto por esperantistoj kiuj interesiĝas pri Kosmologio (filozofio de dana verkisto Martinus). Por aliĝi, sendu malplenan mesaĝon al esperkosmologio-subscribe@egroup.s.com. Por skribi al la listo, uzu la adreson esperkosmologio@egrou.ps.com

AEA-EKZAMENOJ

Informas Marcel Leereveld

1. *Baza.* Under supervision. 400-word list.

All grammar rules & all official affixes

Contents:

1. Grammar questions
2. Esperanto into English
3. English into Esperanto
4. Essay (min. 100 words)
5. Written text = 3 hours, feasible in two sessions of 1½ hours each
- + Oral test (20 questions)

2. *Elementa.* At home. 2 months.

Contents:

1. Grammar questions
2. Comprehension test
3. Esperanto into English
- 4+5. Meaning tests
- 6+7. English into Esperanto
8. Essay (250 words)
- + Oral test

3. *Meza.* Under supervision. 1000-word list.

All grammar rules

Contents:

1. Grammar questions
2. Esperanto into English

3. Esperanto poem into English
4. English into Esperanto (grammar)
5. English into Esperanto (prose)
6. Essay (min. 200 words)
7. Written test = 2x2 hours or 1x4 hours
+ Oral test (25 questions)

4. *Supera*. Hejme. 2 monatojn.

Enhavo:

1. Gramatiko
2. Esperanta poemo Anglen
3. Esperanta prozo Anglen
- 4+5+6. Angla Esperanten
7. Verkaĵo (1000-vorta)
+ Parola ekzameno

5. *Alta*. Sub kontrolo. Ĉiuj oficialaj vortoj

La plej malfacila gramtiko

Enhavo:

1. Demandoj pri la gramtiko
2. Longa traduko Esperanta Anglen
3. Angla Esperanten
4. Verkaĵo (500-vorta)
5. Skriba testo = 2x2 horojn aŭ 1x4 horojn.
+ Parola ekzameno (pri ĝeneralaj, pri la historio de Esperanto, pri la literaturo de Esperanto, kaj pri 5 libroj legitaj)

6. *Klereca*. Hejme. 2 monatojn. *P(I)V* + *P(A)G*

Enhavo:

- A. Tezo aŭ libro aŭ publikigaĵoj
- B. Skriba ekzameno:
 1. Gramatiko (+ pri lingvismaj malsamopinioj)
 2. Tradukoj Anglaj Esperanten (+ sciencaj)
 3. Historio de Esperanto
 4. Literaturo (funde)
- C. Parola ekzameno (+ pri historio + literaturo)

Ekzamenoj ekster AEA:

1. Kursaj (antaŭ-*Bazaj*)
2. Doktorecaj (post la *Klereca*; universitataj) □

NZEA-a Jarkunsido 2001 verkis Howard Gravatt

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio okazigis sian jarkunsidon 2001 ĉe Motelo Alpers Lodge en la komercoplana antaŭurbo Newmarket en Aŭklando, de vendredo la 5a ĝis dimanĉo la 7a de januaro.

Kvankam la nombro da partoprenantoj estis pli malgranda ol ni esperis, la plaĉa etoso de la konferenco en ĉi tiu folioplana antaŭurbo faris la tutan aferon tute agrabla kaj inda.

Prezidanto Bradley McDonald bonvenigis la asocianojn kaj nova ano aliĝis al NZEA.

La ĉeesto de regula vizitantino el Japanio, Tomoko Yoshinaga, kaj juneca Dritan Xhindole el Albanio donis al la kunveno internacian aspekton.

La asociaj elektoj rezultis:

Prezidanto: Bradley McDonald

Vicprezidanto: David Ryan

Sekretario: Howard Gravatt

Helpsekretario: Marieka Bax

Kasisto: Jackie Fox

Estraranoj: Dave Dewar kaj Christian Krägeloh

La Asocio faris iom da ŝanĝoj al la regularo, kiuj malpliigas la grandon de la necesaj kvoromoj por administri jarkunsidojn, ĝeneralajn kunsidojn, kaj komitatajn kunsidojn. Ankaŭ aliaj permesas ke la Asocio aranĝu siajn aferojn per telekonferenco aŭ poŝta voĉdonado.

La partoprenantoj ĝuis la lingvajn sesiojn de Brian Fox kaj Donald Rogers, kiuj ankaŭ provizis Esperanto-historian informadon kaj Esperanto-humorajn artikolojn.

Roy Patterson de la Aŭklanda Universitata Komerca Lernejo, kaj nun nova membro de NZEA, enkondukis konferencanojn en multajn strategiojn por levi la konscion pri Esperanto inter la homaro.

Speciale interesa estis lia ret-paĝo *IOU Help* per kiu li rekomendas la uzon de ludoj kaj konkursoj por

gejunuloj, por estigi en ili familiarecon kun Esperanto.

Post la oficiala fermo de la kongreseto, la dimanĉan vesperon, la plejparto de la ĉeestantoj, kun siaj gastoj, partoprenis agrablan bankedon en la restoracio de Alpers Lodge.

PRI NIA KONGRESO EN LA JARO 2002

La venonta NZEA kongreso okazos en Velingtono je pasko, 29 Marto ĝis 1 aprilo.

Tereza Kapista el Beogrado, kiu instruis en la Somerlernejo en Melbourne, venos por vigligi la lingvolernadon per la Cseh-Metodo.

[El *Argenta Filiko*] □

TREVOR STEELE AKADEMIANO



Trevor Steele

Kun grandaj plezuro kaj fiero ni informas niajn legantojn ke nia membro Trevor Steele elektigis al la Akademio de Esperanto, en la voĉdonado kiu okazis en la unua parto de ĉi tiu jaro.

Trevor estis elektita por naŭjara servo kiel Akademiano, kun la rajto rekandidatiĝi post tiu periodo.

Trevor Steele estas unu el la plej talentaj literaturistoj en Esperanto. Li estas ankaŭ tre sukcesa instruisto. Al li ni esprimas elkoran gratulon. □

La 88-a Japana Esperanto-Kongreso

Dato: 2001.10.12 (ven.) — 14 (dim.)
Kongresejo: urbo Takarazuka, Hyogo, Japanio
Gastejo: Hotelo Takarazuka Grand (urbo Takarazuka).

Japanan kongreson en la unua jaro de la nova jarmilo kaj jarcento ni invitas al distrikto Hokusetu (urbo Ike-

da, Oosaka kaj urbo Takarazuka, Hyogo). Reklamfrazo kongresa estas “Vojaĝo al Esperanto en jaro 2001”. En tiu ĉi jubilea jaro, ni invitas vin al Vojaĝo al Esperanto.

Retadreso: kleg@mvf.biglobe.ne.jp
Hejmpaĝo: <http://www.wombat.zaq.ne.jp/esperanto/jek88/jk88esp.htm>

La 4a Internacia Himalaja Renkontiĝo 2002

26 feb.-8 marto 2002

Ni ricevis riĉan informon pri ĉi tiu renkontiĝo en Nepalo, kaj publikigos pli da detaloj en nia venonta numero. Intertempe, oni povas kontakti la Nepal-an Esperanto-Asocio ĉe:

nrb@ntc.net.np □

VIA REDAKTORO NE PLU AKADEMIANO

Via redaktoro, kies naŭjara membr-eoperiodo en la Akademio nun finiĝis, ne estis reelektita. □

Tri Rakontoj

La ĉisubajn rakontetojn verkis la grupo pri kreema verkado, gvidata de Ronald Gates, dum la Somerkurso en Melburo. Estis sep partoprenantoj en la grupo, kaj ili, unu post alia, aldonis frazon, ĝls aperis sur la blanka tabulo, aŭ sur folio de papero, tuta rakonteto.

Rakonteto Unu: *Bonega Ideo!*

Granda krakado subite vekis min. “Kio okazas?” mi kriis, saltante el la lito.

Mi iris al la fenestro kaj rigardis eksteren. La nokto estis tro malluma por ke miaj okuloj vidu ion. Malantaŭ mi aŭdiĝis mallaŭta sono. Mi eksidis sur la liton, kaj atente aŭkultis dum

kelkaj minutoj, provante diveni pri kio temas.

Subite mi sentis sur miaj piedoj malsekecon! Mi eksciis ke ĉirkaŭ miaj piedoj estas akvo! Mia menso trankviliĝis sufiĉe por ke mi iru trovi la lumŝaltilon. Ne pluvis, sed de la plafono falis guto post guto sur la tapiŝon. Mi aŭdis frapon sur la pordo. Rapide mi transiris la ĉambron por malfermi la pordon. Mi vidis en la malhelo nedistingeblan figuron.

Mi kriis “Kiu vi estas?”

“Ĉu vi ne rekonas min, vian najbaron? Mia filo forrompis la kranon en nia bano, kaj mi ne povas ĉesigi la akvofluon. Ĉu vi havas tauĝan ilon?”

“Ne, mi ne havas, sed mi havas telefonnumeron de la tubisto! Eniru, kaj mi telefonos al li.”

Mi butonpremis, kaj aŭdis voĉon el respondmaŝino: “Mi ne povas veni al la telefono nun. Bonvolu provi denove post semajno!”

Mi cerbumis! Mi turnis min al la najbaro kaj diris: “Mi havas ideon. Ĉu ni iru aĉeti boaton?”

Rakonteto Du: *La Letero*

La maljuna virino malgaje rigardis la foton de la du knabinoj. La gefiloj foriris de la domo por labori en la grandurbo. Ŝia vizaĝo estis malseka de ploro. Subite aŭdiĝis frapo ĉe la pordo, kaj ŝi aŭdis la voĉon de la poŝtisto. “Eble mi ricevos leteron de miaj karaj nepinoj!”, ŝi pensis, dum ŝi rapidiris al la pordo esperkore. “Bonan matenon”, diris la poŝtisto. Mi havas urĝan leteron por vi! Kun tremaj manoj la maljuna virino malfermis la kovrilon de la letero, kaj prenis la folion al la fenestro kie la lumo estis brila. “Bonvolu sendi monon,” la letero tekstis, “ĉar la vivo en la granda urbo estas multkosta!” “Infanoj estos infanaj”, la amema avino ridete diris, dum ŝi reeniris la ĉambron kaj verŝis tason da kafo.

Rakonteto Tri: *La Bonŝanculino*

En trajno sidas juna virino. Ŝi mienas

ege malgaje. Ŝiaj fingroj intertordiĝas. Estas evidente ke ŝi spertas ian mison.

Sidas kontraŭ ŝi en la kupeo avineca virino kiu rimarkas la maltrankvilecon de la junulino. “Pardonu min, sed ĉu io ĉagrenas vin?” ŝi demandis.

Respondis la junulino, “Jes, mi timas ke mi perdis la adreson de la magazeno kie mi devas komenci laboron. Mi pensis, ke mi metis ĝin en mian monsaketon, sed nun mi ne povas trovi ĝin. Kion mi faru?”

“Ĉu vi povas telefoni post kiam vi atingos la urbon, por informiĝi pri la adreso?”

“Sed mi havas problemon. Ne plaĉas al miaj gepatroj ke mi forlasis mian hejmon por labori en la urbeĝo, do mi diris al ili ke mi vizitos amikilon. Estas nenie kie mi povus telefoni por sciigi pri la adreso.”

“Ĉu vi ne povos informiĝi ĉe la telefona informservo pri la adreso?”

“Sed ili ne donas adresojn ... nur telefonnumerojn.”

“Sed se vi havigos al vi la telefonnumeron, vi mem povos telefoni al la magazeno por peti la adreson.”

“Sed kion ili pensos pri mi! La unuan tagon de mia dungiĝo kaj mi perdis la adreson!”

Jam ekstere aperis la unuaj domoj de la urbeĝo. Tre baldaŭ ili atingos la centran stacidomon. Kion ŝi faru?

Ŝi rigardas el la fenestro de la kupeo, kun kuntirita brovo. Sed... kio estas tie? Dum la trajno malrapidiĝas, ekaperas flanke de la fervojo granda aŭŝo reklamanta “Magazeno”, kaj la magazeno estas ĝuste tiu en kiu ŝi estos laboranta.

Ŝi fiksrigardas la adreson por gravuri ĝin en sia memoro!

Al la maljunulino ŝi ekkrias “Jen ĝi! Ĝuste tie troviĝas mia posteno. Kiel bonŝanca mi estas!”

Dum la maljunulino ankoraŭ kun malfacileco ekstaras, la junulino jam kuras laŭ la kajo!

Oz: la lando sen problemoj Praktikaj konsiloj de Joyce Bunting

En Aŭstralio (Oz) la homoj ŝajnas sufiĉe kontentaj. Ili al ĉio respondas: “Nenia problemoj!”

Kial? Ĉu Oz estas vera Edeno?.. Tamen oni diras, ke en ĉi tiu kontinento estas pli da venenaj animaloj ol en iu ajn alia. Ĉu tio estas komploto por fortimigi fremdulojn de Paradizo? Je ĉiu angulo io atendas por ataki vin.

Do, post loĝado ĉe mia frato mi proponas propraspertajn konsilojn al vizitonto de arbaro en norda Kvinŝlando.

Lernu kaj rekonu pik-arbon, kaj neniam tuŝu ĝin! Ĝi jukas multe pli ol urtiko. Pikiloj estas kvazaŭ vitraj kaj venenaj.

Alkutimiĝu al la ĉiea liano, kiun Ozanoj nomas “Atendu Momenton”. Ĝi pendas de arboj kaj rampas surtere. Miloj da ŝirlokoj sur la branĉoj skrapvundos vian haŭton kaj vestaron kaj malrapidigos vian progreson. Se en la arbara mallumo vi zorgas pri la vizaĝo, la liano eble kaptos vin je la piedoj, pro tio Ozanoj nomas ĝin ankaŭ “Jurista Liano”.

Ne tro longe staru senmove en la malseka arbaro. Hirudo fiksos sin sur via haŭto. Ne paniku, kiam oni proponas forbruligi ĝin. Cindro de bruligita papertuko efikas, aŭ salo, aŭ sablo, aŭ alkoholo. Vi eble bezonas alkoholaĵon poste. Nenia problemoj!

Eble tropika ĝardeno estas sekura loko por senkuraĝulo. Sed ne leku malbelan kan-bufon, ĝi portas surdorse venenan glandon! Bonŝance vi halucinigiĝas, malbonŝance vi mortus.

Verdaj formikoj en arbusto kun kudras sian neston el folioj. Sed ne ĝenu ilin ĉar ili mordas kaj rapidege postkuras trudanton.

Papervespoj pendigas sian neston pli alte. Zorgu, kiam vi plukas frukton aŭ tondas gazonon, ne perturbi ilian arbon, aŭ vi eble suferus koleran amas-pikadon, kiel iam spertis mia frato.

Serpenton vi renkontos. Prudente retiriĝu, aŭ prefere restu senmova ĝis ĝi forrampos. Memoru, ke serpento malvolonte atakas homon, sed ĝi ne estas senfine pacienca. Do, se vi vagadas, iru la unua, ĉar serpento kutime mordas la duan aŭ trian en la vicinio. Multaj aŭstraliaj skvamuloj estas tre venenaj, sed la venen-dentoj estas mallongaj. Pro tio la veneno post la mordo eble ne eniros vian sangon. Kunulo bandaĝu firme la morditan kruron aŭ brakon kaj malpermesu al la viktimo (vi) movi tiun korpoparton por ke la veneno ne atingu la koron. Rapidu hospitalen. Kion vi farus, se vi sidiĝus sur serponton, mi tute ne scias.

Admiru grandajn brilkolorajn papiliojn sed ne karesu ties vilajn larvojn pro venenaj haroj.

